



12.841

9







12848/9

12. 844/850

Biblioteko de La Verda Standardo

No. 9.

SKIZOJ EL MIA
PROPAGANDISTA VIVO

VERKIS


A. MARICH

Prezo 36 heleroj (15 sd.)

BUDAPEST, 1911.

LA VERDA STANDARDO

IX., ÜLLŐI-UT 59.



Biblioteko de La Verda Standardo

No. 9.

SKIZOJ EL MIA
PROPAGANDISTA VIVO

VERKIS

A. M A R I C H

BUDAPEST, 1911.

LA VERDA STANDARDO

IX., ÜLLŐI-UT 59.

~~12.449~~
~~260 da~~


12.447/9



11 934



I.



Nia „Unua Ino“.

Kiam mi estis ekkomencinta la esperantan propagandon, tiam-ho; tiam ofte okazis momentoj, kiam oni ne sciis precize ĉu plori aŭ ridegi estus pli bona. La fervoreco preskaŭ eksplodigis min kaj miajn kunulojn. Ni parolis ĝis la sekiĝo de la gorgoj kaj neniu estis sufiĉe sankta al ni. Maljunegaj grizaj avinoj devis konjugi la verbojn *ami*, *salti*, k. t. p.. Mezuokte kaj frumatene la unuaj silaboj elparolitaj estis — Esperanto. Serioze ni proponis al bakistoj baki verdkolorajn bulkojn! Preskaŭ ni fariĝis legomomanĝantoj, ĉar inter tiuj ĉi manĝaĵoj regadas sur majesta trono la — verdkoloro. Poste, kiam ni trovis en la vortaro du hungarajn vortojn, tiam . . . sed tiu ĉi okazintaĵo fariĝis jene.

Ĉiu sabate ni kunvenis, junaj esperantistoj, vespere je la oka horo. Nature mi jam post la tria horo posttagmeze fariĝis nervoza kaj volis jam je la duono de la kvina forkuri senkolome kaj ĉapelmanke. Ĉiuj parencoj, naj-

baroj kaj inoj kuris post mi kaj unu portis mian kolumon, la alia ĉapelon, gantojn, k. t. p. Fine mi feliĉe atingis la klubojn, kie mi trovis grandan bruon. Jam ĉe la pordo atendis min unu el la anoj kaj pale senvoĉe montris al mi la vortaron esperantan, kie mi trovis du vortojn substrekitajn, *Gulaŝo kaj Kolbaso*.

Mi sentis min kiel la paŝtisto en la fabeloj, kiun sorĉis bonema feino. „Milionojn da kravatpingloj kaj kelke da kolumbutonoj“ — kriis mi. „Kameradoj!“ — daŭrigis mi la entuziasmigitan vortĉeneron — „do“ kaj ĉiu komprenis min. „Kelnero“ — aŭdiĝis nia unuvoĉa kriego kiel tondrego en la pola grandaltmontaro, „donu al ni gulaŝon kaj kolbason“.

Ni manĝis kiel kanibaloj post trisemajna studado de la biblio. De tiu ĉi tempo longe ni manĝis nur tiujn ĉi du *vortojn*. Kiel mi poste aŭdis, la mastro de la gastejo sekrete diris al sia najbaro, al iu *dika* fadenfabrikanto, ke en sia gastejo havas kunsidon kurioza sekto, kies anoj *nur unufoje manĝas semajne!*

Aliafoje okazis — mi povas bone rememori — okazintaĵo, kiu . . . sed mi volas vice rakonti la aferojn. Estis aŭtunvespero. Ni jam kune estis. Unu el niaj anoj rimarkis, ke inter niaj anoj ankoraŭ ne troviĝas — virino, ina

esperantisto. Dum niaj bedaŭroesprimoj malfermiĝis la pordo kaj — kaj, ho, okuloj miaj! ĉu vi bone vidas? — envenis, diru, skribu, legu *virino!*

La unua, kiu interesiĝis pri nia karega lingvo. Ni tute ne kredis en la vereco. Preskaŭ ni palpadis ŝin per manoj, por la certiĝo, ke ŝi estas vera, viva virino.


Mi ŝin esploris, ekzamenis pense kaj rigarde. Iomete mi sentis sur la dorso malvarman febron. Ŝi estis iomete maljuna, sed senriproĉeble malbela. Sur ŝia kapo kuŝaĉis kiel blinda kokino sur duonjaraĝaj ovoj — teruriga ĉapelo. Tiu ĉapelo jam ŝajne ludis rolon en la historio, kaj la kolorharmonio, ho ve! Sed kion ni povis fari, ŝi estas la unua. Ni akceptis ŝin bonkore. Fine ŝi ekparolis. Kiel basbarutona pozaŭno en Wagner-a opero, traflugis ŝia voĉo en la aero. Du anoj lasis fali la glasojn, el kiuj ili sin freŝigi volis. Ŝi diris humile ke ŝi volas aliĝi nian societon kaj lerni la lingvon. Dum ŝia paroladeto balanciĝis ŝia kapo kaj kune kun la kapo la supre priskribita ĉapelo, sur kiu — mi forgesis diri — troviĝis duonmetrogranda kokplumo, kiu donis, kaŭze de balancado vangofrapojn al la malfeliĉaj forflugantaj muŝoj. Tuj post ŝia deklaro unu el niaj anoj komencis kurson. Li parolis pri homa kulturo, pri helpa lingvo, pri sciencoj k. t. p. Post la kurso nia

„unua“ klinadis kontente sian kapon kaj diris ke ŝi enpaŝos tuj en nian societon, ĉar Esperanton ŝi trovas tre bona ideo. Sed ŝi maltrankvile sidis sur la seĝo kaj volis ankoraŭ ion diri. Mi demandis ŝin. Ŝi respondis, „Sro. Prezidanto ĉu ... ĉu ... en ĉi ... tiu societo oni ricevas ... pension, kaj ... kiom ... da? —“ !!!...

Mi forgesis fermi la buŝon. „Ĝi“ opiniis, ke nia societo estas fondita por grizulflegado kaj kiel mi poste aŭdis por edziniĝigi maljunajn virinojn!!

Mi forkuris sen ĉapelo. La unuafoje kaj lastfoje kiam mi el nia societo sen ĉapelo el iris. De tiu tempo mi ĉiam jam de malproksime evitegas virinojn, kiuj havas historiopasintan ĉapelon kun duonmetrogranda kokplumo. Jen la historio de nia „Unuaino“.

II.



Permutacio, kombinacio kaj variacio, aŭ malfeliĉa sorto.

Jes, miaj karegaj Gelegantoj (mi opinias ke mi havas tiujn!), per via silenta suferado kaj nevola toleremeco mi daŭrigas la suprediritan kaj titolitan spritaĵaron. Jes, spritaĵaron! ĉe tiu ĉi vorto mi volas iomete haltadi. Jam longe mi volis fariĝi sprita homo. Miaj ambicioj kulminiĝis jam „ĉiim“, „ĉiam“ kaj „ĉiom“ en tiu ĉi unu punkto — esti sprita. Sed — bedaŭrinde mankis ĝis feliĉa okazo la bezonata kapableco. Nur kiam oni elektis min ano de la Esperantista Vagabonda Klubo, — tiam ho! mi fariĝis sprita, ĉar ĉiu E. V. devas esti sprita jam profesie! Tial mi eltrovis novan sistemon por fariĝi kaj reorganizi la dekadentan homaron. Farigu ĝin do je Vagabondisto kaj... tuj ni havos spritan generacion!

Tial mi ricevis la kuraĝon por babiladi kaj rakonti diversajn historietojn al mia samideanaro. (Pardonu!). Jes, tuj kiam mi fariĝis Vagabondisto, mi ricevis spriteman kapablecon. En mia kapo ekbruliĝis Di-a fajrero, tiome ke mi jare ŝpari povas sumeton por mia propaganda

agado, ĉar supreflua estas por mi aĉeti alume-ton ekbruligante ĉion . . . per la supre priparolita Di-a fajrero. Sed — mi daŭrigas la historietaron. Ofte oni per la praktikismo (?) konatiĝas kun diversaj sciencoj. Ho ! la moŝta, potenca empirika folozofio, per vi ni povas vere sperti.

Nun, mi rakontos, kiamaniere mi konatiĝis kun la pli alta matematiko. Pli antaŭe mi krom la granda „Unufojeunu“ sciis nur malmulton el ĉi tiu interesa sed tro seka scienco. Sed nun — ! Sed sekvu vice la aferoj.

Kiam mi la unuan fojon ricevis la sciigojn de ia unua esperanta kongreso, tiam ekmoviĝis en mi la tuta provizo da ambicio kaj entuziasmo. Iri al la kongreso estis mia tuta penso kaj volo. Sed — ekzamenante mian situacion, mi je mia teruro eksciis la sekvantajn teruraĵojn. Mi kiel malriĉa homo estis okupita por akiri la devivpostulitan monerorimedon bezonotan de la sepa matene ĝis la sesa vespere en iu tre malbone aerumigebla fabriko ; de sepa vespere ĝis la naŭa horo mi havis honoran oficon en la „Tutlanda Klubo de la Legomomanĝantoj“. Je la unua mi ĉiumonate ricevis korajn promesojn anstataŭ salajro. Krom la semajnotagoj, dimanĉoj kaj aliaj solenoj — mi estis ĉiam libera. Ekzemple en 1905 estis granda fajro en la fabriko, tiam unu tagon, en 1907 pro demonstracioj tuturbaj duontagon, kaj

fine en 1908 du semajnojn mi havis kiel liberan tempon (tiun lastan mi songis).

Tiaj estis la cirkonstancoj, kiam mi la unuan fojon decidis viziti la kongreson esperantan. Laŭ la vereco, mi devas sincere konfesi, ke tiu ĉi decido ĉiam pli kaj pli fortiĝis en mi, okaze de la vice sinsekvantaj kongresoj. Eĉ la lastan mi estis preskaŭ vizitinta, ĉar nur libera tempo kaj monero mankis. Ĉiujn aliajn, nome kuraĝon, ĝojon, entuziasmon, entreprenon, esperantan instruitecon eĉ kapablecon mi amase magazinis kaj havis sufiĉe.


Dum la tempoj la maljuna Kronos forpelis kaj alproksimigis la kongresojn, kaj mi — ĉiam restis hejme, sed devigite restis. Per tiu ĉi praktika spertado mi konatiĝis kun la pli alta matematiko kaj kiel sola frukto de miaj penadoj, revoj, songoj kaj esperoj, mi starigis la sekvan-tan tabelon :

Kombinaĉio, permutacio kaj variacio. (Varme dediĉita al nia Bricard.)

KONGRESO.	MONERO.	LIBERTEMPO.
I-a Kongreso.	Mi ne havis.	Mi ne havis.
II-a Kongreso.	Mi ne havis.	Mi havis.
III-a Kongreso.	Mi havis.	Mi ne havis.
IV-a Kongreso.	Mi havis.	Mi havis.

En la lasta momento, kiam mi jam volis forsendi tiun ĉi artikolon, amiko mia mirinde rimarkis, ke laŭ la tabelo mi estus devinta iri en la Kvaran. Kaj tiam mi devis konfesi, ke mi en la lasta linio forgesis la sensignifan vorto „ne“ ! Ho ! Eĉ laŭ la matematiko mi devus esti irinta kaj tamen mi ne povis. Kial do ? Ĉar en mia variacio nur la vorto „ne“ povas ŝanĝi la lokon (sed „mi“ ne povas). Do mia matematiko akirita per la viva spertado — estas tute alia, kiel tiu de la scienco. Mi tre petegas do miajn altestimatajn geajn legantojn, ke ili bonvolu korekti la tabelon per la vorto „ne“ (en la lasta linio). Mi tute forgesis diri ke mia Hamleto ne filozofias kiel kutime „ekzisti aŭ ne ekzisti“, sed „ne ekzisti aŭ malekzisti“. Kiu tion ne kredas, bonvolu fariĝi oficisto en malbone aerumigebla fabriko kaj havi promesojn kiel salajron, sed ne forgesu ankaŭ akcepti honorajn oficojn en klubo de legomomangantoj.

III.



Religio kaj Anarĥismo.

Alten la suno brilegis hele, kaj mi agis same, kiam la luno troniĝas sur la stelara ĉielo; esperantiĝis! Sed tiutage mi iomete ĉesigis jam pli frue mian agadon, ĉar mi volis viziti la samvesperan operon. Mi surmetis proksimume kvin esperantajn signojn, pinglojn k. t. p.; ĉar mi eĉ momenton ne lasis senuzita por frukta propagando esperanta. Mi serioze volis pentri verdan steleton sur la kranion de mia amiko, kiu min estis akompanonta; sed li ne akceptis tiun ĉi por mi tute naturan proponon. Fine alvenis la vespero. Ni, mia amiko kaj mi, feliĉe atingis la teatron. En la enirejo de ĉi tiu mi renkontiĝis kun malnova kaj jam longe ne vidita amiko. Ho! bonan vesperon mi diris al li. Ĉu vi jam legis la novan numeron de Lingvo Internacia, kaj kion faras nia kolego? Mi devas rimarki ke mia amiko apartenas al nuanco de tre malnova religio kaj havas longegan kolon, pri kiu li ofte malsanecon plendis. Mi nun tre serioze volis sciigi

pri lia nuna saneco. Li rigardis min kun ronde malfermitaj okuloj kiuj ŝajnas esti muelŝtonoj, kaj min demandis miregigite. Lingvo Internacia, nova numero ... legi? Kion vi parolas? Mi ne komprenas vin. Sed mia kolego Mayer fartas bone dank al liaj novaj hispanaj botoj. Nun mi rigardis lin kun — malgrandaj okuloj, ĉar se mi pri io aŭ iu miras, tiam mi male de aliaj — havas malgrandajn okulojn. Mayer! — mi diris — nun mi ne komprenas vin.

Li daŭrigis, „eble vi demandis S-ron. Schwarz? Ne. S-ron Allan? Ne. S-ron ... ne, ne, ne! Sed kion vi volis? Mi havas ja neniajn aliajn kolegojn. Ho, jes! Nun mi rememoris ke mi parolis „kolego“ esperante al li kaj kolego signifas ankaŭ krom la kapon kaj trunkon kuniganta korpopeco ankaŭ kameradon. Pardonu amiko, mi eraris, mi parolis al vi esperante. Se vi eble ankoraŭ ne estis aŭdinta ion pri ĉi tiu nova kaj mirinda helplingvo, tiam enskribigu en nian societon kaj post kelka tempo vi jam posedos tiun ĉi necesan helpilon. (Tie ĉi kiel kutime mi jam ekflamiĝis entuziasme). La pordo de la civilizacio malfermiĝas antaŭ vi kaj vi povas facile interrilatiĝi kun la tuta homaro, kaj ... sed nun oni sonorigis kaj ni devis diseniri la teatron.

Ni iris kaj mia amiko al mi promesis venontan sabaton viziti nian klubejon. En

la opero mi tre ĝojeme aŭskultis la teatraĵon — mi povas memori oni ludis „La Norda Stelo“. Tutvespere mi pensadis je nia norvega (tiam ankoraŭ ekzistanta) esperanta revuo, kiu havis saman nomon.

Samsemajne, kiam okazis ĉi tiu afero, mi trankvile iradis en la klubon sabate. Kiam mi eniris, oni prezentis al mi novan homon. Nature kiel kutime oni ne komprenas ĉe la reciproka prezentiĝo la nomon diritan. Tiun ĉi sciante mi tre laŭte diris mian nomon kaj tre fiere mi aldonis kiel profesio — esperantisto. Sed la homo diris nenion nur sin klinis profunde kaj residiĝis. Mi opiniis, ke tiu ĉi homo povas esti iu tre moŝta sinjoro kaj komencis paroladi longe. Miaj klubanoj volis al mi ion diri, sed mi atentis je nenio kaj daŭrigis nur mian paroladon, kvazaŭ ĉiu vorto estus direktita al tiu ĉi nova Sinjoro (kiu ŝajnis esti tre moŝta). Intertempe venis leterportisto kaj portis al mi leteron de ĉi tiu supredirita amiko, kiu promesis en la opero tiam, hodiaŭ veni. „Kara amiko“ skribis li, „bedaŭrinde mi ne povas hodiaŭ veni pro teknikaj malhelpaĵoj, salutas vin, via amiko. N. W.

Mi metis poŝten ĉi tiun leteron kaj daŭrigis mian paroladon rigardante ĉiam tiun ĉi novan gaston, (kiu ŝajnis esti tre moŝta). Mi jam parolis pli longe ol unu horo, kiam fine

nia gasto (kiu ŝajnis esti tre moŝta), ekkomencis moviĝi per la manoj kaj... kaj pro mia teruro — li faris tre kuriozajn grimacojn — mi tuj ĉesigis mian paroladon kaj lin mi demandis, „kion vi bezonas estimata Sinjoro?“ (Li ŝajnis esti tre moŝta). Anstataŭ respondi li nur malfermis la buŝon kaj mi aŭdis aron eeee iiii aaaa. Poste li montris al mi libreton. Ho! diablo! li estis delegito de la surdmutula instituto kaj iris de klubo al klubo por kolekti monon al surdmutuloj, estante mem tia. Mi fermis miajn okulojn kaj kune kun mi komencis turniĝi ĉio.

Mi forkuris straten por gustumi freŝan aeron. Tie mi kolere ŝovegis la manojn en la poŝon kaj mia zorgplena vizaĝo denove ricevis ĝojan karakteron. Mi trovis la leteron de mia amiko kaj decidis lin viziti tuj, esperante lin tute konvinki, lian tutan familion gajni por nia afero. Kune kun li mi esperis ankaŭ konigi nian lingvon al liaj konatuloj, inter kiuj troviĝas tre riĉaj homoj, kiuj certe donacos moneron al nia societo. Per monero oni ĉion povas fari. Ni havos tre elegantan klubejon grandan kaj bonan riĉan organon. Mi abonigos je ĉiuj revuoj esperantaj, organizos belegan kaj grandan bibliotekon de esperanta literaturo. Tiam ni havos pli ol mil anojn. Por ili mi povos aranĝi ĉe ni esperantan kongreson kie mi...


mi atingis fine la serĉitan loĝejon de mia amiko, kaj kun la plej bonaj esperoj mi sonorigis sur la pordo. Mi ofte vizitis lin kaj la familio tre amis min. Nur lasttempe min okupis Esperanto tiome, ke mi ne havis tempon zorgi aliajn aferojn, nur sole esperantajn. Oni malfermis la pordon kaj mi eniris. Mi staris jam nun antaŭ la familio. Oni min tre malvarme salutis. Mi tre miris pri la afero kaj jam ĵus mi volis demandi la kaŭzon, kiam la patrino ekkomencis paroli. Rajte povus esti skribinta patrinego, ĉar ŝia korpa distanco estas — estas — kiel mi diru — jam supernatura.

„Sinjoro mia“, komencis ŝi, „mi ŝatis vin ĉiam kiel bonan amikon de nia familio kaj mi neniam suspektis vin-vin per homdoloriga iniciatemo, sed ho ve! miaj karegaj gepatroj vekigu, kion mi devis per vi, jes per vi, vi, vi — su... su... fe... fe... re... ri... ri...!“ Mi ne sciis ĉu mi estas knabo aŭ knabino! En la plej terura konsterno mi prenis okulvitron mian kaj volis ĝin ekbruligi, sed pro teruro mi ĉesigis la vanan penadon, ĉar ŝi, Ŝi, Ŝiego denove komencis. (Mi komencis maltrankvile mian seĝon malrapide malproksimigadi de ŝi). „Jes, vi volas disrompi nian harmonian familian vivon, brubuhuhu; sskh, ssskh. Ni hi dudu huhuhu, nian filon, sskh, sskh, vian amikon, ni lin hhhhhh! Ĉiam sskh laŭ familiaj tradicioj

edukis kaj ajajajaj venis vi kaj ... lin ... vi
logi volis, delogi volis, forlogi volis, ellogi
volis el lia familia hejmo kaj lin konduki en
duban araĉon da sekretaj politikaj sektoj vo-
lante devigi lin forlasi hubuhuhu, sskh... sian
religion malnovan huhuhuhuhu ... uu ... ii!!
... Mi metis buŝen mian okulvitron kaj pena-
dis poŝon meti mian cilindron kaj ... kiel
kutime forkuris ...

Post du semajnoj je la duono de la kvara
posttagmeze en granda pluvo sen pluvombrelo,
mi aŭdis, ke oni opiniis ĉe tiu ĉi familio, ke
mi estas anarĥisto kaj samtempe fondis novan
religion.

IV.



La Barbo de la Profeto.

Post kiam . . . , jes, post kiam. Kial Vi min rigardas, karaj Gelegantoj? Ĉu Vi eble ne scias, ke ĉiu vera historio aŭ epizodo havas sian propran „post kiam“-on? Kompreneble jes, ĉar ĉiu aĵo, eco, aŭ ulo havas ja kaŭzon. Do . . . Post kiam, jam feliĉe vekiĝis la interesiĝo de la homoj pri Esperanto; ĝi vestiĝis kaj iris promeni en la bela, sunradioriĉa, printempa vetero. Dumtempe mi ricevis krom nazkataro kaj entuziasmo, inviton por vojaĝi en L*.*-n. Vane mi provus esprimi al Vi mian feliĉon, ĉar mi tute ne kapablas disponi kun sufiĉa kvanto da indaj vortoj . . . Ĉi tiuj punktoj signifas mian malspaciencon, kiu min turmentadis suferigeme ĝis la alveno, de la granda tago, . . . ne, Tago, . . . ne Tagego . . . ne, *TAGEGO* (Nu rigardu, kiel malfacile, kiel penoplene mi trovas la konvenan vorton. Sed se mi ĝin trovas!) Fine ĝi tamen alvenis per rapidvagonaro kaj mi forvojaĝis per tio persona.

Sed mi devas rakonti ankoraŭ pliantaŭe ion al Vi. Mi ricevis de unu el miaj korespon-

dantoj la supre priskribitan inviton. Tiun Sinjoron — ni nomu lin S. — mi ankoraŭ ne konis persone. Li korespondis kun mi tiel vigle kaj tiome entuziasmoplene; ke mi opiniis lin, kiel fervoran junulon, mi mem estante tia. Li raportis al mi ĝoje, ke li kunvokis grandan publikan kunvenon kaj mi devas ĉitiuokaze havi la propagandan paroladon. Tio ĉi estis la kaŭzo, pro kiu mi sidadis kaj meditadis en kupeo de personovagonaro iranta en L*-*-n. Tiam, kiam mi meditadis dumvoje en la kupeo; la kalendaro kaj la horloĝo montris kune kun en plena harmonio 1907-an februaron kies vespero jam preskaŭ atingis kun 14 minutoj kaj 59 sekundoj post la trikvaronoj da horo la sepan horon. Ekstere preterkuregis telegrafostangoj, nudaj arboj kaj la ventego venkoplene ĵetegadis la pluvogutaron al la fenestroj de mia kupeo. Interne en mia animo regadegis ankaŭ ventobatalo kolera. Anime mi jam estis antaŭ mia aŭskultantaro kaj parolegis. La pakajteniloj, la preniloj, ingoj kaj ujoj la ejoj kaj iloj, unuvorte la tuta aĵaro de la kupeo iĝis antaŭ miaj okuloj je publiko, ĝis fine post forta puŝiĝo mia kofro defalis sur miajn piedojn kaj la vagonaro ekhaltis ĉe L*-*.

Mi tre bedaŭris la interrompon de mia fantazio, ĉar mi ĵus volis akcepti la permanentesprimotajn gratulojn de eminentuloj. Kom-


preneble la manoj etenditaj al mi tuj malaperis kaj mi varme premis la prenilon de la varmo-reguligilo. Tuj fariĝis terura malvarmo. Feliĉe mi devis jam forlasi la kupeon.

Mi nur nun rimarkis, ke mi forgesis mian insignon verdstelan. Mia junulo min do ne povas trovi, ĉar ankaŭ li ne konis min persone. Povante nenion alian fari, mi ekstaris inter unu poŝtkartaŭtomato kaj du gazlampoj. Mi estis plensutita per lumradioj kaj mia vizaĝo brilegis pro ĝojo. (Mi ĉiam opiniis, ke nur la junularo povas fari efikan propagandon, estante ĝi entuziasmoplena kaj fervora.) La personoj post unu la alia forlasis la stacidomon ĉu unuope, ĉu tri, aŭ kvarope. Fine krom unu maljunaĝa sinjoro la staciejo fariĝis preskaŭ senhoma. Kion mi faru nun? Mi estis ankoraŭ neniam en tiu ĉi urbo kaj mi konas neniun persone. Pro manko de rimedoj kaj pli bona ideo, mi aliris al tiu griza longbarba maljunulo: *Pardonu kara mia Sinjoro! Mi estas tute fremda en L*.**, ĉu Vi eble povus al mi afable diri; kie loĝas Sinjoro S. La maljunulo min rigardis tre mirigite: *Mi estas S., sed kiu Vi estas?* Ĝojoplene mi ekkriegis kaj pensis, kiel facile oni povas ofte atingi la celon. Sed en tiu momento, kiam la maljunulo al mi diris, ke li estas S.; iomete mi surpriziĝis, ĉar mi jam opiniis, ke mia amiko estas junulo, sed ke li eĉ tiel juna estas


ke la patro mem devas alveni, — tion mi ne sciiis. Mi do honorplene kliniĝis antaŭ li kaj mi scivoleme demandis: *Ĉu Via estimata filo ne povis kun Vi veni? Mi estas M. el Budapeŝto.* Li min plue rigardegadis kaj lia buŝo malfermiĝis: *Mi... Mi... Mia... fi... filo? ... Mi ne havas filon. Sed kial restis hejme Via patro?*

Nun mi komencis miregadi. Cu li estus mia „junulo“? (Ho miaj revoj pri juneco!) Sed mi tute ne komprenis lin. Kion li volas de mia patro, kiu jam longe mortis? Mi eĉ turniĝis, por ke mi vidu, ke eble liaj vortoj koncernas iun personon starantan apud aŭ malantaŭ mi. Sed vane, nur la poŝtkartaŭtomato staradis modeste malantaŭ mi. Mia embaraso ĉiam pli kaj pli grandiĝis. Fine mi jam volis mian vojaĝbileton anstataŭ sukero engluti. (Ĝi estis tre maldolĉa): *Mi... Mi... a... pa... patro? Mi-mi ne-ne havas patron. Mi estas Via korespondanto. Sed kiel longan barbon Vi havas.* En tiu momento li forĵetis sian pluvombreton kaj penadis malfermi anstataŭ ĝi, sian brulantan cigaron: *Vi eeeeeestas ???!! — ! — ! — ...* *Sirnojo ... Ho! ... Sijrono ... Ha! Rosinjo ... Hi ... papapardonu ... Sinjoro M?* Sed Vi estas juna homo kaj mi imagis Vin kiel grizan profesoron kun longa barbo ... Kaj Vi eĉ ... barbeton ... ne havas ... Ho!

Ni rigardis unu la alian dum kelkaj minutoj senyorte, poste ni komencis babiladeti Esperante. Ĵus malaperis la reciproka malkonfido jam post la unuaj Esperantaj silaboj. Ni ĝismorte, forte kunamikiĝis. Je la granda tago mi parolegis tiel elokvente kaj prudente, tiel ŝaĝe, kiel maljunaj multe spertintaj profesoroj. Mia maljanulo vidante la sukceson ĝojis kiel infano. Samvespere okazis granda festeno, kiam mia amiko min, kiel maljunan Esperantiston pritoastis en la nomo de junaj Samideanoj. Jen estas Esperanto, kiel la plej bona kozmetika ilo. Maljunuloj fariĝas per ĝi junaj. Junuloj akiras per ĝi longan barbon (almenaŭ en la imago.) Depost tiam nia tiea grupo ĉiam ĵuras pro rememoro de ĉi tiu epizodo gaja per „je la barbo de la profeto“.



V.



Kiamaniere mi vojaĝis kongresen.

La suno jam leviĝis de sia orienta, brila trono kaj disfaldante sian ororadiaron, ĝi komencis vagadi sur la bluriĉa ĉiela vojo. La malgrandaj steletoj fermis siajn okuletojn pro la nevenkebla brilokonkuro. Nur unu steleto brilis eĉ brilegadis; tiu, la Kvinpinta en mia butontruo. Unuvorte, mi ankaŭ estis jam vagadopreta. (Propagandistoj devas ĉiam frumatene leviĝi.) Mi ĵus matenmanĝis, t. e. mi trinkis du glasojn da freŝa akvo kaj enspriregis ĝuoplene grandegan kvanton da saniga someraero; kiam la poŝtisto (homo ĉiam tre kara) alportis al mi la invitilon de la „Sesa Kongreso.“ La batoj de mia koro, kvazaŭ kaŝitaj tondregoj, preskaŭ sufokis min pro entuziasmo. Jes, mi... mi deeeevasss iri al la kongreso. Jes, jes!!

Tuj mi purigis mian solan spegulon zorgeme kaj atente, por ke ne defalu hazarde la vitropecetoj, kiuj per gluaĵo estis surgluitaj sur enkadrita dika papero (Unuvorte ĝi foje falis

teren kaj rompiĝis.) Poste mi provis aranĝi mian vestaron festan.

Sub mia lito mi trovis post longa penado mian frakon trankvile kuŝantan inter malnovaj kamentuboj. La kamentubojn mi heredis de mia onklo, kies ĝenerala ĉefheredinto mi estis; ricevinte ilin kiel lian tutan heredaĵon. La frakon dank' al Dio mi donace ricevis de donacemulo (ankoraŭ ekzistas tiaj homoj!), ĉar ĝi estis por li tro malgranda. (Kaŭze de la pura vero, mi devas konstati, ke ĝi estis por mi tro granda. Jen la diferenco inter la homoj!) Nun mi komencis salonkapabligi mian frakon. Mi rememoris, ke iam mi studadis ĥemion dum miaj lernejoj jaroj. Utiligante do tiamaniere la restaĵojn de mia iama eksinstruiteco, mi prenis inkon, petrolon, nigrajn paperojn kaj dentobrosilon (pro manko de alia) kaj komencis purigi ĉi tiun maljunaĝan korpokovrilon. Kiel pantalonon mi havis mian solan, sed jam multon spertintan krurokovraĵon. Ĝia deveno ne estas malpli interesa ol tiu de la frako. Antaŭ dek jaroj, kiam mi volis edzinigi ineton; tiu malsukcesplena entrepreno postulis la duonon de mia pantalonon kiel oferon. (Aliaj homoj perdas la emon kaj la dentojn, sed mi nur la duonpantalonon!) Unuvorte, nur la duonon da ĝi mi povis hejmen porti savite.

(La alia duono, kiel . . . mi . . . diru, dis-

peciĝis ... dum ... dum ... la ... batalo.) Mi estas ŝparema homo kaj mi konservis la restaĵon por pli bonaj tempoj. Kiu scias, kio okazos?! Fakte post kvin jaroj de la supre priskribita priplorinda afero (nun mi jam ĝojas!) mia loĝejestrino alportis al mi kun brilantaj okuloj — okaze de mia naskiĝa datreveno, pensu, opinii, imagu, legu, skribu, aŭdu — duonon da pantalone, kiel sian dankosignon, ĉar mi foje senmuŝigis pasintsomere ŝian ĉambron. (Ducentsepdek milokcennaŭdek kvin muŝojn, tri skarabojn, unu araneon, sep vermojn kaj dekunu alumetskatolojn mi kaptis dum mia rezulta ĉasado. El la ĉasaĵo mi preparis belan skarabokolekton, kiun mi vendis.)

Fine alvenis, aperis, efektiviĝis miaj sonĝoj! Mi ricevis la alian duonon. Kvankam la parvenua duono estis iomete verdemkolora kontraŭe al la alia duono, kiu ŝatis ankoraŭ la obstinecon resti ĉe la nigra koloro; tamen per la kudroarto de mia loĝejestrino ili plenharmone kunfratiĝis. La afero estis tute simpla, ĉar la verdkolora parto dum la longaj jaroj malpuriĝis kaj iome nigriĝis, la nigra duono pro la longa uzado perdis la intenzivan nigran koloron kaj -- verdiĝis. Tiuj ĉi ridindaj cirkonstancoj kaŭzis jam post duonjaro malgajigan aferon, ĉar la nigra parto efektive verdiĝis kaj

la verda parto fakte nigriĝis. Sed je la diablo, oni ja ne povas postuli de ĵus kunfratiĝintaj, pantalonpartoj kolorostudadon. Poste ekzistas koloroblinduloj! (Precipe ĉi tiuj lastaj min esperigis.) Unuvorte mi preparis mian vestaron.

Nun sekvis la plejgrava problemo, la financa stato de mia monujo. (Por miaj celoj okulvitrujo servis tre taŭge kiel monujo. Ĝi apartenis iam al mia avino mortinta en 1807.) Eĉ la plej zorgema esplorado ne povis alian rezulton dokumenti, nur unu Spesmilon, tri spesojn kaj kvin ludmonerojn. Mia humoro tuj ĥaosiĝis inter konfuzo, surprizo kaj embaraso. En tiu ĉi minuto oni enportis ĉambren la supon. (La tempo tre rapide pasas.) Por gajni forton mi volis iom manĝi, sed je mia teruro mi pro mia anima emociozigzago enverŝis la supon en la okulvitrujon kaj per la kulero mi volis buŝen meti la monerojn. Mi preskaŭ ploris. La bona, malnova okulvitrujo tuj fariĝis senuzebla.

Poste oni alportis viando... — odoron el la kuirejo kun pano kaj salat... — koloran glason da akvo. Dum mi nutriĝis, oni ne fermis la pordon kaj mi bonguste manĝis la panon kun la viandodoro, ofte rigardante la glason salatkoloran (Jen estas metodo, laŭ kiu oni povas nutriĝi ankaŭ naze kaj okule.) Poste mi image ekfumis bonegan cigaredon. Oni ofte kutimas kuŝiĝi post bonega

tagmanĝo. Mi same faris. Mi meditadis pri kolektado de mono.

* * *

Alitage mi tuj verkis petoskribaĵon sendotan al la registaro, per kiu mi petis subtenon. La subtenon mi ricevis kaj mi mem ankaŭ kolektis jam sufiĉe da mono. Do mi povis forvojaĝi. Ameriko estas tre malproksime, sed tamen mi feliĉe atingis nian kongresurbon. Dum la fervojovojaĝo mi trovis ulon, kiu deklaris Esperanton sencesnaĵo. Mi riproĉis al tiulo lian restademon, liajn malbonajn opiniojn. Poste ni komencis kriadeĝi. Mia kontraŭulo min atakis. — Mi defendis min. — Eĉ mi batis lin. — Li desaltis pro timo de la vagonaro. — En miaj manoj restis nur lia surtuto. — Mi kolerege dispecigis la tutan ajon. En tiu momento mi ... vekigis. (ĉar mi nur sonĝis ĉion.) Antaŭ miaj okuloj sur la tero kuŝis mia sola festa pantalonon dispecigita, ĉifonita, tute ne plu uzebla. Jen, mi ne havis plu festan pantalonon. Eĉ mi ne havis (eble-as kaj-os) monon. Tio ĉi estis la historio de mia kongresvojaĝo. Dum longaj jaroj mi ĉiam pli kaj pli spertis tiun gravan fakton, ke se la registaro subtenas kulturaferojn, tiam oni sonĝas!




ENHAVO.


	Paĝo
Nia „Unua Ino“	5
Permutacio, kombinacio kaj variacio aŭ malfeliĉa sorto	11
Religio kaj anarhismo	17
La Barbo de la Profeto	25
Kiamaniere mi vojaĝis kongresen	33











1974 JUN 26

